# nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2018

## LIBROPREZENTADO EN PRESTIĜA KULTURCENTRO

La literatura vespero en marto fariĝos eksterordinara: ni prezentos libron ne en la sidejo sed en prestiĝa kaj signifoplena loko: la kulturcentro Blanquerna.

Tie ni prezentos por la madrida publiko libron en Esperanto, jam konatan de multaj el niaj legantoj, kiu nun trovos pli ampleksan eksteran aŭskultantaron: "Tagoj kaj ruinoj", taglibro verkita de la kataluna esperantista verkisto kaj intelektulo Jaume Grau Casas dum lia plurjara restado en prizonkoncentrejoj en la sudo de Francio post la hispana interna milito. La verko kompilas tekstojn redaktitajn plejparte en la hispana, tradukitajn al Esperanto de Miguel Fernández, kaj eldonitajn de SAT-en-Hispanio kun la prizorgo de Pedro Sanz.

La evento okazos la 12-an de marto, lundo, je la 7-a vespere. En la prezentado partoprenos ĝuste Miguel Fernández kaj Pedro Sanz, kiuj rakontos (en la hispana) pri la aŭtoro, la cirkonstancoj de la verkado, la retrovo de la tekstoj kaj la nuna eldonado. Ilin prezentos José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

Blanquerna estas institucio dependa de la delegacio de la registaro de Katalunio en Madrido, kies sidejo troviĝas en la strato Alcalá, fronte al la Círculo de Bellas Artes kaj apud la sidejo de la Banco de España. Ĝi unuafoje gastigas prezentadon de libro en Esperanto; kutime la libroj prezentataj estas en la kataluna aŭ la kastilia kun rilato al Katalunio, kaj en tiu ĉi kazo la graveco de la verkisto kaj lia rilato al la kataluna kulturo (li estis interalie la ĉefredaktisto de la *Kataluna Antologio*, tre sukcesa eldono en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento) ebligis tiun ĉi eksterordinaran gastigon.

Ricevantoj de tiu ĉi bulteno ricevos krome retan invitilon al la prezentado, por diskonigado inter amikoj kaj ajnaj homoj interesiĝantaj pri kulturo, literaturo kaj historio.

## KONGRESOJ EN MADRIDO

Aperis en la reto pliaj informoj pri la kongresoj okazontaj en Madrido en julio 2018 (77a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 51a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), en la adreso: http://www.esperanto.es/kongreso/. Tie troviĝas interalie mapo de situo de la lokoj kie okazos la kongresoj: la universitata rezidejo "Colegio Mayor Teresa de Jesús" plus la ceteraj rezidejoj de la komplekso apartenanta al la Universitato Complutense kaj la Fakultato de Filologio de la UNED (Universitato de Neĉeesta Edukado). En la foto, Manolo kaj Águeda pozas ĉe enirejo de la studenta rezidejo.



Ĝis nun aliĝis 45 homoj. Vidu la liston http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/listo-de-aligintoj. Memoru ke la unua aliĝperiodo finiĝos la 31-an de marto, do eble antaŭ la alveno de la venonta numero de nia bulteno. Aliĝu do kiom eble plej rapide, por profiti la favorajn kondiĉojn. Ligilo al la aliĝilo troviĝas en http://www.esperanto.es/kongreso/.

## NOVA RENKONTO EN MADRIDO EN JULIO

Alia internacia renkonto okazos en Madrida Regiono en somero: temas pri la tendaro organizata de la Verdaj Skoltoj. Ĝi okazos ekde sabato la 28-an de julio ĝis sabato la 4-an de aŭgusto, en Los Molinos, proksime al Madrido, en tre komforta loko, kies retejo kun fotoj estas vizitebla ĉe http://casa.elcolladito.com/galeria-de-fotos/.

La datoj estas elektitaj tiel ke junuloj povos poste viziti la Internacian Junularan Kongreson, okazontan en Badajoz inter la 4-a kaj 11-a de aŭgusto. Pliaj detaloj ĉe: www.verdajskoltoj.net.

## FEBRUARAJ KUNVENOJ



Kiel ni skribis en pasinta "Nia Voĉo", la februara literatura vespero okazis la lundon 12-an de februaro, per legado de ĉapitroj de la libro "Memoraĵoj de kampara knabo", la traduko al Esperanto de unu el la plej popularaj libroj de la nuntempa galega literaturo, verkita de Xosé Neira Vilas kaj tradukita de Suso Moinhos.

En la unuasabata renkonto en kafejo Madrid partoprenis 13-14 homoj. Vidu apudan foton por konatiĝi kun la etoso.

## VIZITIS NIN

Korea samideano Amira vizitis la sidejon, kune kun sia filino, la 5-an de februaro.

Anne-Marie, el Nederlando, vizitis Madridon, kaj ĉeestis la lundan kurson la 12-an de februaro kun Andy.

Fine de februaro vizitis Madridon niaj kantabraj amikoj Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Pedro Ullate, kiuj profitis la okazon por rendevui kun iberskolanaj literaturistoj.

## RADIO UTOPÍA

La elsendo de Radio Utopía, pri kiu ni informis en pasinta Nia Voĉo, estis prokrastita ĝis tiu ĉi monato, je la 16-a de marto. Oni povos ĝin aŭskulti el San Sebastián de los Reyes kaj la norda parto de Madrido, kaj ankaŭ rete ĉe la adreso http://www.radioutopia.org.es/olvida-tu-equipaje/.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. En marto tamen oni ne malfermos la 12-an, pro la prezentado en Blanquerna, kaj probable ankaŭ ne la 26-an por la festa periodo.

La unuasabata renkontiĝo okazos la 3-an de marto, ekde la 18:00 horo en nova loko: kafejo ("cantina") de la kulturcentro Medialab Prado, strato Alameda 15, tre proksime al Paseo del Prado, apud Caixa Fórum, metrohaltejo Atocha.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com